KOMUNIKOJ

TRIMONATA BULTENO DE SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ

Jaro 38-a BRAZILO, JULIO-AŬGUSTO-SEPTEMBRO 2014 N-ro 155

"Amu vian Dion per via tuta koro kaj per via tuta animo kaj per via tuta menso kaj vian proksimulon kiel vin mem."
JESUO (*Mt*, 22:37-40).

"Neskuebla fido estas nur tiu, kiu povas rekte rigardi la racion en ĉiuj aĝoj de la homaro."
KARDEC. *La Evangelio laŭ Spiritismo.* Ĉap. 19, §7.

"Sur neŭtrala lingva fundamento, komprenante unu la alian, la popoloj faros en konsento unu grandan rondon familian."
ZAMENHOF. *La Espero*.

# ASOCIO LORENZ KAJ UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

## BONAERO 2014

Ĉiel ĉiujare okazas, Asocio Lorenz partoprenas la plej grandan eventon de nia komunumo: ĉi-jare, la 99-an Universalan Kongreson de Esperanto, en Bonaero, Argentino. En la kadro de la programo, nia Asocio partoprenis la Movadan Foiron, kie disdonis spiritismajn librojn kaj la bultenon Komunikoj; kaj ankaŭ organizis Rondan Tablon, kiun ĉeestis preskaŭ cent gesamideanoj, el plej diversaj landoj.

La prelegintoj, Paulo Sérgio Viana kaj Maria Nazaré Laroca disvolvis la temon pri Reenkarniĝo. Paulo prelegis pri Reekarniĝo laŭ la Spiritisma Doktrino kaj Reenkarniĝo en la Biblio. Sinjorino Nazaré pri Kelkaj Evidentaĵoj pri Reenkarniĝo. La resumon de tiuj du prelegoj ni aperigos sur la paĝoj de Almanako Lorenz 2015, kies lanĉon ni efektivigos okaze de la Brazila Kongreso de Esperanto, en Rio-de-Ĵanejro kaj ankaŭ okaze de la UK, en Francio, 2015.

Alia interesa momento de la kunsido de Lorenz estis la lanĉo de la tradicia Almanako Lorenz 2014.



## AMIKOJ DE LORENZ

**La AMIKO DE LORENZ de ĉi tiu numero de KOMUNIKOJ estas nia kara JADER RODRIGUES DA SILVA, brazilano, el la bela urbo "São João del Rei". Li estas kutima kunlaboranto de ASOCIO LORENZ, kaj multe helpas nin per siaj altkvalitaj revizioj. Li estas beletristo kaj postdiplomiĝas pri Interlingvistikaj Studoj en la pola Universitato Adam Mickiewicz, en Poznano.**

**Al li, nian elkoran brakumon!**



## PREĜO DE LA AFLIKTITOJ KAJ AGONIANTOJ


Di', ho Patro de l' plorantoj,
De l' malgajaj, sklavigitaj,
Fortikaĵo de l' venkitaj,
Konsol' de ĉia sufer',
Kvankam en erar' ni ploras,
Kaj de l' peko nutras flamon,
Ni petegas Vian amon
El ĉi ekzil' sur la Ter'.

En l' afliktoj de la vojo,
En la nokto plej malhela,
Via riĉa fonto bela
Fluigas bonon sen fin';
L' eterna lumo Vi estas
De l' ĝoj' kaj paco sur Tero,
Nia pordo de l' espero,
Kie Vi akceptas nin.

Kiam ĉio nin forlasas
En mondo de larma pano,
Kiam blovas uragano
Sur florojn de l' iluzi',
Vi, Patro, estas la lumo,
De la certeco la kanto,
De ĉiaj baroj venkanto
Kaj de l' dolor' tie ĉi.

En tago de nia morto,
En forlaso aŭ turmento,
Estu forges' nia sento
De l' ombro, malbon', dolor'!
Ĉe nia vesperkrepusko
Ni sentu, ke viv' alia,
Pura, lumas nin, ĉe Via
Feliĉa paco, Sinjor'!

XAVIER, Francisco Cândido. **Paŭlo kaj Stefano**. Historia romano diktita de la Spirito Emmanuel. El la portugala lingvo tradukis L. C. Porto Carreiro Neto. Rio de Janeiro: Brazila Spiritisma Federacio, 1966; unua parto, ĉapitro 8 – "La morto de Stefano".



**KUNLABORU! COLABORE!**
**Membriĝu ĉe LORENZ kaj helpu la disvastigon de Esperanto kaj Spiritismo en la tuta mondo!**

*Associe-se à LORENZ e auxilie a divulgação do Esperanto e do Espiritismo em todo o mundo!*

LORENZ
**"KOMUNIKOJ"**
TRIMONATA BULTENO DE LORENZ – SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ
Fondita la 15-an de decembro 1975
Jaro 38-a – n-ro 155 – Julio-Aŭgusto-Septembro 2014

Interreta kaj papera senpagaj eldonoj
Ĉirkaŭ dudek mil legantoj en la tuta mondo

**KONTAKTIĜU KUN NI KAJ ALIĜU:**
Spiritisma Eldona Asocio F. V. Lorenz
Rua Francisco Vale, 57 Engenheiro Leal
21370-171 Rio de Janeiro-RJ – Brasil (Brazilo)
Telefonoj: + **55-21-2221-2269** - + **55-21-2450-4768**
Skajpo: **Lorenz Editora** | Fejsbuko: **Editora Lorenz** | Retadreso: **editora_lorenz@uol.com.br**




Kompostita de Rogério Mota



# Kuriozaĵoj el la leteroj de Zamenhof

Al Majnov – 1890

Estimata amiko!

Kun danko mi ricevis la ekzempleron de la “Okraina”. Mi legis ĝin kun plezuro kaj resendas ĝin al vi hodiaŭ kune kun tiu ĉi letero.

Pri la respondo al la amikoj

Ni rekomendas al la legantoj la rubrikon “Respondoj”. La Respondoj ne havas karakteron personan (ĉar personajn respondojn ni donas per leteroj), sed ĉiu respondo povas ĉiam ekster la adresato havi intereson ankaŭ por aliaj legantoj.

IOM Reviziita Plena Verkaro de L. L. Zamenhof. Originalaro 1. Unua etapo de Esperanto – 1878-1895. Tokio: Eldonejo Ludovikito, 1989.

## LEGANTE ALMANAKON LORENZ

Ni invitas niajn amikojn relegi interesajn artikolojn publikigitajn en ALMANAKO LORENZ. Ĉi-foje, jen parto de prelego farita de LENKA ANGELOVÁ, el Ĉeĥio, kaj publikigita en ALMANAKO LORENZ 2011.


**NE ESTU SOLA!**

Oni diras, ke dividita ĝojo estas duobla ĝojo, dividita doloro estas duona doloro. Eble vi povas konfirmi tion al mi. La homoj renkontiĝas pro la plej diversaj kialoj. Ni renkontiĝas en nia okupo, en la lernejo. En nia familio ni kutime trovas iun, kiu sentas kun ni, kiu komprenas niajn problemojn kaj al kiu ni kredas kaj konfidas sentime. [...]

Se ni havas ŝancon kaj trovas amik(in)on, kun kiu ni povas dividi ion komunan, ĝi estas graco. Tia homo povas aperi el mallumo kiel bona spirito. Ne dependas de via fizika aspekto, vestaĵo, konfeso aŭ aliaj diferencoj. Se renkontiĝas du animoj, komprenas unu al alian eĉ sen vortoj. [...]

Ni ne postulu, ke nia amiko estu perfekta. Ni amu lin tian, kia li vere estas – kun liaj eraroj kaj mankoj, ĉar same tiel li amos nin. Perfekta homo ankoraŭ ne naskiĝis!

**ALMANAKO LORENZ**. Tridek-unua jaro. Rio de Janeiro: Spiritisma Eldona Asocio Francisco Valdomiro Lorenz, 2011; p. 115-119






### KONU LA NOVAN RETPAĜON DE LORENZ!

ASOCIO LORENZ havas plaĉan surprizon por siaj amikoj! Jam estas atingebla ĝia nova retpaĝo! Tie oni trovas la antaŭajn numerojn de KOMUNIKOJ kaj ankaŭ de ALMANAKO LORENZ! Eniru kaj legu ilin laŭvole!

Jen ĝi:

**http://editoralorenz.blogspot.com.br**

# SPIRITISTA-ESPERANTISTA SEMAJNO

Okazis de la 6-a ĝis la 12-a de Setembro, kun la temo “Esperanto laŭ la spiritisma vidpunkto” la 4-a SPIRITISTA-ESPERANTISTA SEMAJNO de la Federacia Distrikto. La evento estis realigo de Brazila Asocio de Esperantistoj-Spiritistoj (BAES), kun la apogo de Brazila Spiritisma Federacio (BSF). La solena malfermo (vidu foton) estis en Braziljo, en la sidejo de BSF. Dum la SEMAJNO, oni okazigis prelegojn kaj disvastigis la temon en pluraj spiritistaj grupoj de la regiono.





# KOREAJ SAMIDEANOJ VIZITAS RION

Kun granda ĝojo kaj bela festo, la kariokaj esperantistoj ricevis en Rio-de-Ĵanejro, kun malfermitaj brakoj, la koreajn gesamideanojn D-ro Gilsu kaj s-ino Ungum. La etoso de la renkontiĝo estis tre agrabla kaj la simpatiaj geamikoj entuziasme partoprenis la eventon, respondis demandojn, dancis kaj kantis en la internacia lingvo.



# EL LA EVANGELIO – “NECESO DE L’ ENKARNIĜO”

*Kaj liaj disĉiploj demandis lin, dirante: Kial do diras la skribistoj, ke Elija devas veni antaŭe? Kaj li responde diris: Vere Elija venas antaŭe, kaj restarigos ĉion; sed mi diras al vi, ke Elija jam venis, kaj oni ne konis lin, sed faris al li ĉion, kion ili volis. Tiel ankaŭ la filo de la homo estas suferonta sub ili. Tiam la disĉiploj komprenis, ke li parolis al ili pri Johano, la Baptisto. (Mateo 17:10-13)*

La paso de la Spiritoj tra la enkorpa vivo estas necesa, por ke ili povu plenumi, per helpo de materia agado, la planojn, kies plenumon Dio konfidis al ili. Ĝi estas necesa al ili mem, ĉar la aktiveco, al kiu ili estas devigataj, helpas la elvolviĝadon de l’ intelekto. Estante suverene justa, Dio donas egalan taskon al ĉiuj Siaj infanoj; tial Li donas al ĉiuj la saman deirpunkton, la saman kapablecon, *la samajn devojn kaj la saman liberecon de agado*; ĉiu privilegio estus prefero, kaj ĉiu prefero estus maljustaĵo. [...] Kiuj plenumas tiun taskon kun fervoro, tiuj venkas rapide kaj malpli pene la unuajn gradojn de sia inicado kaj pli frue ĝuas la frukton de siaj klopodoj. Kontraŭe, kiuj faras malbonuzon de la libereco, kiun Dio donas al ili, tiuj malfruigas sian progresadon; kaj laŭ sia obstineco, ili povas senlime bezoni reenkarniĝon; tiam la enkarniĝo estas puno. (Sankta Ludoviko. Parizo, 1859)

KARDEC, Allan. *La Evangelio laŭ Spiritismo*. El la franca lingvo tradukis Ismael Gomes Braga. Rio de Janeiro: Brazila Spiritisma Federacio, 2008; ĉap. IV – “Neniu povos vidi la regnon de Dio, se li ne naskiĝos denove”; §§ 3, 25-26

# ESPERANTISTAJ POETOJ

*Baldur Ragnarsson*



Ni forgesis
ke ankaŭ hodiaŭ matene
sin levis la suno
la floroj malfermis la petalojn
la birdoj kantis kiel ordinare
la infanoj prenis siajn ludilojn
kaj la dolĉa vento kunportis iliajn ridojn
en la serenan bluon.

Ni forgesis tion
inter la premoj de l' vivbatalo,
blindaj, senmovaj muroj,
je la memamaj vidoj de l' indiferento,
sub la kalkanoj de l' malamo
kaj la piedegoj de l' stulto
ŝtalo
            vitro
            ŝtono
ĉio artefarita
falsa kaj supraĵa.

Ni forgesis
aŭskulti la flustron de l' koro
pri la nokta vivo de l' maro
pri la mola kresko de l' herbo
pri la flava silento de l' lumo.

Ni forgesis
ke ankaŭ hodiaŭ matene
sin levis la suno.

Poemo de Baldur Ragnarsson el la verko "La lingvo serena: plena originala verkaro", redaktita de Mauro Nervi kaj eldonita de Edistudio en 2007.

Baldur Ragnarsson (1930-), islandano, gimnazia instruisto, lerneja ĉefinspektoro. Honora membro de UEA, eksa estrarano de UEA pri kulturo kaj eduko, vicprezidanto de Esperantlingva Verkista Asocio. Li verkas poezion, literatur-kritikon kaj multajn artikolojn pri Esperanto en islandaj revuoj, krom dekoj da Esperantaj tradukoj el la islanda. (Resumo el informoj trovitaj en "Ordeno de Verda Plumo: leksikono pri esperantlingvaj verkistoj", verkita de Josip Pleadin k eldonita de GRAFOKOM en 2006)

# ALVOKO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO (UEA) AL JARO "MONTEVIDEO 60"

En Decembro 1954, en sia Ĝenerala Konferenco en Montevideo, Unesko akceptis la faman rezolucion, per kiu ĝi agnoskis la kontribuojn de Esperanto al ĝiaj agadkampoj (edukado, scienco kaj kulturo).

UEA nun alvokas al komuna festado de la Jaro "Montevideo 60", por marki tiun signifan datrevenon kaj por elstarigi la rimarkindan progreson de la lingvo sur tiuj kampoj en la lastaj 60 jaroj.

La Jaro servu por konsciigi kaj klerigi membrojn de la E-komunumo pri niaj tradicioj kaj atingaĵoj, por stimuli la organizadon de novtipaj aranĝoj kaj projektoj, kaj por montri tiujn atingaĵojn al ne-esperantista publiko, aparte informante kaj invitante Unesko-respondeculojn al la koncernaj eventoj. La informoj divastiĝu ne nur en E-revuoj, sed ankaŭ ĉe televidkanaloj, radiostacioj kaj retradioj – ne sole E-lingvaj. Aparta artikolo kun pliaj detaloj pri la Jaro "Montevideo 60" aperas en la oktobra numero de la revuo "Esperanto".

Mark Fettes, prezidanto de UEA

Barbara Pietrzak, UEA-estrarano pri la Jaro "Montevideo 60"

Legu pli en la revuo Esperanto, oficiala organo de UEA. Abonu ĝin:

**http://db.uea.org/alighoj/alighilo.php**



# EGALECO DE RAJTOJ DE VIROJ KAJ VIRINOJ

*José Passini*

Virinoj suferadas tra la tempoj kaj ankoraŭ suferas malegalecon de rajtoj eĉ en la religiaj medioj.

Jesuo siatempe klopodis rompi la terurajn morojn, kiuj forte diskriminacias la virinojn. Li havis la kuraĝon akcepti Madalenon en sia grupo, kiu jam entenis plurajn virinojn. Poste Paŭlo, la Apostolo, sekvis la ekzemplon de Jesuo kaj fondis diversajn familiarajn kristanajn grupojn kun helpo de valoraj virinoj. Sed la homoj lasis flanken la instruojn kaj la ekzemplojn de Jesuo, kaj reprenis la antikvajn kutimojn.

En 1869, en Anglio, Stuart Mill publikigis la verkon “Submetado de la Virinoj”, kiu atentigis la eŭropan societon pri tiu gravega maljusteco, kiun suferadas la virinoj. En la 8-a de Marto 1857, en la urbo “Cotton”, Usono, oni metis fajron en fabrikejo, kie estis 129 virinoj, kiuj faris strikon, kies nura postulo estis egaleco de salajro. Tiu dato poste fariĝis la “Internacia Tago de la Virinoj”, laŭ propono de germanino Clara Zetkin, dum la Dua Jara Konferenco de Virinoj, en Kopenhago, en 1910.

Sed oni devas rimarki, ke en 1860, tio estas, naŭ jaroj antaŭ la publikigo de la verko de Stuart Mill, Allan Kardec publikigis, en Francio, la definitivan eldonon de “La Libro de la Spiritoj”, en kiu li pritaktas la temon sub la morala, religia, filozofia kaj etika vidpunktoj.

Nuntempe pluraj religioj ŝanĝiĝis rilate al la egaleco de rajtoj de viroj kaj virinoj, sed aliaj ankoraŭ ne sukcesis akompani la evoluon okazintan eĉ en la laikaj societoj. Inter la okcidentaj religioj, Spiritismo plene respektas la egalecon de rajtoj de viroj kaj virinoj, en ĉiuj situacioj kaj niveloj, ĉar ĝi, kiu estas doktrino kodigita de la franco Allan Kardec, estas tute bazita sur la instruoj kaj ekzemploj de Jesuo.

# SPIRITAJ KAŬZOJ DE L’ KORPAJ MALSANOJ

Por la surtera homo sano povas signifi la perfektan ekvilibron de la materiaj organoj; por la spirita sfero tamen sano estas la perfekta harmonio de la animo, por kies akiro estas plurfoje necesa la altvalora kontribuo de la malsanoj kaj nedaŭraj surteraj neperfektaĵoj.

La vundoj de la animo manifestiĝas tra la homa envolvaĵo. La malsana korpo spegulas la internan staton de la malsana Spirito. La patogenezo estas tuto da malsuperaĵoj de la psika aparato. En la animo kuŝas ja la primara fonto de ĉiuj definitivaj kuracaj rimedoj. [...]

La reenkarniĝo per si mem jam prezentas, en la cirkonstancoj de la mondo maljuniĝinta pro la misuzoj, ian stadion de flegado kaj kuracado, kaj estas animaj malsanoj tiel persistaj, ke ili povas postuli plurajn sinsekvajn stadiojn, kun la sama intenseco, kiel en la regeneraj procesoj.

XAVIER, Francisco Cândido. *La konsolanto*. Diktita de la Spirito Emmanuel. El la portugala lingvo tradukis esperanten Benedicto Silva. Rio de Janeiro: Brazila Spiritisma Federacio, 1977. §§ 95-96

La libro *La konsolanto* estas senpage elŝutebla en:

http://www.febnet.org.br/blog/geral/estudos/download-elsutoj/

